

# *Ora Ĵurnalo*

Numero 57, Decembro 2022



*Hallandsstugan en Slottsskogen.*

Magazino por kulturo kaj plezuro

*Bonvolu viziti nian retpaĝon:*

**[www.esperanto-gbg.org](http://www.esperanto-gbg.org)**

# Enhavo

Enhavo.....	2	Konsiloj de la Birdcentro.....	18
Pri Ora Ĵurnalo.....	2	Strange – la fungoj bezonas okulvitrojn!.....	19
La ĉiela stelo alteriĝis.....	2	Pensoj pri pensoj.....	19
Espeporko meditas.....	3	Ankaŭ strange.....	19
Vintraĵaj hajkoj.....	3	Vojaĝo al Uzbekio.....	20
Ora Ĵurnalo nun kvinjara.....	4	La oka afrika kongreso okazos en Senegalo	21
Kanto al libereco.....	5	Ni armigu la lingvan politikon!.....	22
Iam abundis esperantistoj en Gotenburgo....	6	La Lingvodefendo en Svedio avertas pri estonta superregado de la angla super la sveda.....	24
Kio okazas en decembro en pola urbo ĉe la Balta Maro?.....	8	Inköpsförslag till stadsbiblioteket i Göteborg.....	26
Svedio, de la aŭstria horizonto.....	9	Aŭtuna ardo kaj someraj sonĝoj.....	27
Hungara verkisto skribas pri stranga sveda tradicio.....	10	Esperantorörelsen behöver medlemmar!...	30
Interesaj homoj en Esperantujo.....	15	Gotenburgo 400-jara – aŭ 402-jara.....	31
Poemo de Johan Ludvig Runeberg el Idyll och epigram.....	16	Libroj kaj Librorondo.....	31
La mondvegana tago, la 2an de novembro..	17	Leteramikoj.....	31
Granda buntpego.....	18		

## Pri Ora Ĵurnalo

Ora Ĵurnalo estas eldonata de Esperanto-Societo de Gotenburgo por subteni la esperantobibliotekon en Stannum, Östadsvägen 68.

Redaktantoj: Siv Burell, 070-721 34 79, [siv.burell@gmail.com](mailto:siv.burell@gmail.com) kaj Ingegerd Granat, 073-502 53 32, [ingegerd.granat@gmail.com](mailto:ingegerd.granat@gmail.com).

Fina paĝaranĝo: Andreas Nordström, [arendsian@hotmail.com](mailto:arendsian@hotmail.com).

Limdato por manuskriptoj estas la 1:a en ĉiu monato. Ni deziras kontribuaĵojn pri kulturo, naturo, lingvo, vivstilo, sano, manĝaĵo kaj rakontoj en diversaj temoj.



*La ĉiela stelo alteriĝis*  
por lumigi la mondon suferplenan  
eĉ nian lokon  
– kiu havas pacon – panon –  
por ke ni vidu – estu pretaj

### *La ĉiela stelo alteriĝis*

por helpi ilin  
kiuj – perdinte ĉion –  
timante iradas el unu lando al la alia.



*Aira Kankkunen*



## Espeporko meditas



- ♥ Unue, sonigu fanfaron por **Ora Ĵurnalo**, nun kvinjara!  
En novembro 2017 ne multaj kredis ke ĝi travivus eĉ unu jaron.  
Ĝi rapide trovis sian stilon – aŭ eble mankon de stilo – ĉar ĝi volis speguli ĉion. "Mi donos ion interesan por ĉiuj", estas la devizo. Dank' al la artikoloj, kiuj pli kaj pli venis de vi, la legantoj, la horizonto larĝiĝis.
- ♥ Eĉ se decembro estas streĉa monato kun multe da devoj, vi ja povas ripozi legante ekz. la historion pri Sankta Luĉio, kiu timigis eksterlandan gaston, kiu imagis ke li mortis kaj renkontis anĝelojn. La verkisto, Ferenc Szilágyi el Hungario, fariĝis sveda civitano kaj loĝis en Borås. Liaj rakontoj enhavas multe da humuro.
- ♥ En Pollando oni vere zorgas pri tradicioj. La urboj brilas, la fantazio prosperas. Ni certe bezonas lumon kaj fabelojn dum mallumaj tempoj.
- ♥ Konsiloj de la Birdcentro cerbumigas min. "Ne nutru birdojn per pano! Pano estas bona, sed malriĉa je nutraĵoj." Ĉu mi donu la saman konsilon al homoj????
- ♥ El Samarkando ni ĉiun jaron havas leteron de esperantisto, kiu admonas nin celebri la historie riĉan urbon je la datreveno. Helena ne nur distance

admiris la uzbekan urbon, sed mem iris al Uzbekio kaj spertis la Silkan Vojon, kaj raportis al Ora Ĵurnalo. Dankon!

- ♥ El niaj najbaraj landoj ni plej ofte havas kontakton kun Finnlando. Ĉi tiun fojon Saliko konatigas nin kun la artisto kaj inventisto Markku Sarastamo kaj per interreto ni legas poemon de la svedlingve parolanta finna verkisto Johan Ludvig Runeberg.
- ♥ Se vi image volas senti la afrikan varmon, vi povas ĉeesti la okan afrikan kongreson per Zoom.
- ♥ Por la unua fojo ni povas legi artikolon el Albanio. Tamen temas pri skota artikolo, kiun Bardhyl Selimi el Albanio tradukis en Esperanton. Birgitta, kiu studas la albanan, havas kontakton kun Bardhyl.
- ♥ En 2023 ni celebros la 400an naskiĝtagon de Gotenburgo, du jarojn pli malfrue pro la pandemio. Ni promesis al la aranĝantoj de la celebros, ke ni skribos multon pri la urbo. Ingegerd nun kontribuas per priskribo de la malnovaj dometoj en Slottsskogen. Estas vere bela heredaĵo.
- ♥ Ni revidu unu la alian en 2023. Feliĉan Kristnaskon kaj Bonan Novan Jaron! /Siv

## Vintraj hajkoj



En glacikristalo  
dormas kaptita  
ruĝa acerfolio

*Shiki*

Pluvombrelo – nur unu  
preterrapidas  
en la neĝa vespero



*Yaha*





## Ora Ĵurnalo nun kvinjara

La 19an de novembro 16 personoj celebris la naskiĝtagon de Ora Ĵurnalo en la iama bakejo de Hökälla. Kiel enirbileto al la festo ĉiuj kontribuis per eta desertfromaĝo por la granda "fromaĝopleto." Unue Ingegerd diris bonvenon kaj prezentis la jubileulon – Ora Ĵurnalo. Christin faris saluton per sia trumpeto. Ni manĝis kaj babilis ĝis estis tempo por la programo.

Jesper faris bonan esperantan tradukon de la sveda kanto: "Du är det finaste jag vet" – Kanto al libereco. Li kantis – ni kantis – kaj per sia ukulelo li akompanis nin. Li estas instruisto kaj politikisto, sed tamen li trovas tempon por Esperanto.

Poste Juhaina kantis sirian kanton, kun mola, agrabla melodio. Ni ja ne konas la araban, kaj iu demandis pri la temo de la kanto. Ni divenu! Jes – kompreneble temas pri amo.



Esperante Lasse legis fabelon de la Fratoj Grimm. Temis pri Tri fratoj. Lia voĉo kaj klara legmaniero faris ke ni sufiĉe bone povis kompreni la fabelon eĉ se ni neniam antaŭe konis ĝin.



Lasse, Helfrid kaj Margareta.



De maldekstre: Ingrid, Alma, Juhaina kaj Erika.

Erika tre ĝuis la rakonton, kiun ŝi antaŭ delonge tre bone konis. Ŝi posedas du svedlingvajn librojn de la Fratoj Grimm kun mirindaj bildoj.



Margareta prizorgis ke ni povis lui Hökälla-n. Ŝi apartenas al la hejmgregiona societo, kiu administras la domon en la kultura parko de Lillhagen.

Ĉe Helfrid ni pli frue ofte havis nian kristnaskfeston. Ni ĝojas revidi ŝin.

Lasse kun Ingegerd gvidis la demandkonkurson pri konataj personoj.

Instruisto ĉiam instruas. Jesper ĵus trovis ke Helena, kiu neniam antaŭe lernis esperanton, tamen komprenas multon.

Ni ankaŭ kantis pliajn kantojn. Laŭ mi, io mankas ĉe esperantaj kunvenoj, se oni ne iomete kantas. Do, vi estas trezoro, Jesper!

Kiam ni forlasis la mojosan domon estis ekstere tute malhele. La venonta kunveno en Hökälla povus esti printempa festo, ĉu ne? /Siv

*Kanto al libereco*, traduko de "Det vackraste jag vet" en Esperanton de Jesper, sufiĉe nova gotenburga esperantisto. La fono estas kanto de Björn Afzelius: Sång till Friheten (Kanto al la libereco), sed la kanto troviĝas en diversaj versioj.

<https://www.youtube.com/watch?v=hxjjuOxUwIU>

Jen la esperanta teksto de Jesper:

## Kanto al libereco

Vi estas la plej bela, laŭ mia kor'  
Vi estas la trezoro de la mondo  
Vi estas kiel la steloj, kiel la ventoj, kiel la ondoj, kiel la birdoj, kiel la floroj sur la tero.

Vi estas mia gvidstelo kaj amik'  
Vi estas mia kredo, espero, mia amo.  
Vi estas mia sango kaj miaj pulmoj, miaj okuloj, miaj ŝultroj, miaj manoj kaj mia koro.



Helena kaj Magnus kunkantas en la kanzono, kiun Jesper esperantigis.



Libereco estas via bela nom'.  
Amikeco estas via fierpatrino.  
Justeco estas via frato, paco via fratino,  
batalo via patro, estonteco via respondec'.

Vi estas la plej bela laŭ mia kor'.  
Vi estas la trezoro de la mondo,  
Vi estas kiel la steloj, kiel la ventoj, kiel la ondoj, kiel la birdoj, kiel la floroj sur la tero.

Libereco estas via bela nom'!





## Iam abundis esperantistoj en Gotenburgo. Jen foto de 1935.



Okazas ke ni en la gotenburga klubo ricevas esperantaĵojn. Mi ekhavis la eblecon viziti 99-jaran Ingrid Becker. I.a. ŝi havis aron da poŝtkartoj de sia patro, kiu multe korespondis kun esperantistoj el diversaj landoj. Mi miris pri ŝia vicleco. Ŝi facile moviĝis. Okulvitrojn ŝi nur uzis por legi. Aŭdilojn ŝi tamen uzis. Bonan memoron ŝi vere havas. Mi atendis rakontojn de la iama gotenburga Esperantujo, sed ne estis ŝi, kiu estas esperantisto, nur ŝia patro, Arno Becker.

Estis somera sesio de la gotenburgaj esperantistoj en Pixbo 1935. Ankaŭ Ingrid ĉeestis. Ŝi sidas inter la helkoloro vestitaj knabinoj en la fronto. Ŝia patro Arno Becker staras ie maldekstre. Ankaŭ frato de Arno, Bruno Becker, loĝis en Gotenburgo kaj laboris kiel oraĵisto. Ingrid ĝuis esperantajn kunvenojn eĉ se ŝi ne lernis la lingvon.

Arno Becker eltranĉis buston de Ludoviko Zamenhof kaj starigis ĝin sur soklon. Entute la objekto havas mezuron de 17 cm.

La unuaj paĝoj de la vortaro de Arno Becker estas dekoritaj per glumarkoj. Li korespondis kun "la tuta mondo", sed mem ne multe vojaĝis.

Arno Becker laboris ĉe SKF. La fabriko posedis kaj ankoraŭ posedas la insulon Lilla Brattön ekster la provinco Bohuslando. Tie oni konstruis somerdometojn, kiujn la laboristoj povis lui. Ankoraŭ hodiaŭ la posteuloj de SKF-laboristoj povas lui la





Jen novfarita bildo Ingrid Becker.

dometojn. En la centro de la insulo estas moderna restoracio, kie la somergastoj povas vivteni la etoson de la malnova SKF. Eble inter ili ankoraŭ troviĝas personoj, kiuj povas paroli Esperanton. Ankaŭ aliaj fabrikoj havis esperantajn klubojn, ekz. ESAB.

Nun la poŝtkartoj de Arno troviĝas en la esperanta biblioteko de Stannum.

Interese, almenaŭ por gotenburgoj, povas esti klasfoto de Fjällskolan en 1937. Plej proksime sidas Ingrid Becker, tiam 13-jara.



Sur la familia foto staras juna Arno Becker. Plej dekstre staras lia frato, Bruno.



Lönnermarks klass 6:e året 1936-37 i Fjällskolan.

Ŝi rakontis pri diversaj aferoj en Gotenburgo, ekz. pri sia fratino Ester Becker, kiu tre aktivis en la klubo por virinaj gimnastoj, Sköldmön (la Ŝilda Fraŭlino), kaj ankaŭ membris en ties estraro. Oni volis doni al ŝi diplomon pro longdaŭra deĵoro, sed ŝi mortis, kaj oni anstataŭe transdonis la diplomon al Ingrid.

**El interreto:** En 1882, Kvinnliga Gymnastiska Sällskapet Sköldmön estis formita, la unua ina gimnastika asocio de la lando. Sed kiel virinoj, vi neniel rajtis montri vian korpon, kaj tial ili devis plenumi siajn gimnastikajn ekzercojn en la Ekzercdomo en longmanikaj kaj altkolaj bluzoj, jupsimilaj vestoj kaj

ĝisgenuaj pantalonoj. Malgraŭ tio, estis kuracistoj, kiuj avertis pri la "malsanaj eksperimentoj", kaj aliaj diris, ke estas maldece por virinoj plenumi kelkajn el la gimnastikaj movadoj. Sed tio ne haltigus Sköldmön, kiu ankaŭ dediĉis sin al remado kaj piedmigrado. Ilia unua publika gimnastika prezentado okazis en la Ekzercdomo en 1888, kie la spektantaro iam konsistis el 400 invititaj virinoj. Pasis kvar jaroj antaŭ ol la unua vira futbala matĉo estis ludita en Svedio.

/Siv





# Kio okazas en decembro en pola urbo ĉe la Balta Maro?

Elwira Tardowskaja fotis la jenon. Ŝi bone rakontas fabelojn, sed ĉi tiun fojon ŝi lasas al mi fari tion.

Mi pensas, ke estas misteraj ŝipoj kun sekreta skipo...



kiu kaptis blankan urson...



...kaj la kristnaska viro venas al la urbo.



Li montras heraldikan simbolon kun leonoj kaj fabelaj estaĵoj ĉe la abio.



Anĝeloj venis...







kaj paco nun estas en la tuta mondo — aŭ ĉu mi eraras??? /Siv

## Svedio, de la aŭstria horizonto

Walter Klag, Aŭstrio, skribis:

### 1) Pri la klimataktivuloj kaj ilia proceso kontraŭ la sveda ŝtato

**Svedio:** Klimato-aktivuloj asignas la ŝtaton. Pli ol 600 junuloj, inkluzive de la klimataktivulino Greta Thunberg, prezentis proceson kontraŭ la sveda ŝtato pro manko de klimata ago. La

proceso estis preta dum preskaŭ du jaroj kaj nun ĝi estis prezentita kontraŭ la fono de kritiko de la klimata politiko de la nova dekstrula registaro.

### Anton Foley klimataktivisto kaj iniciatoro de Auroro



## 2) Analizo de indikitaj paĝoj

Walter daŭrigas: "Se oni rigardas la statistikon pri vizitoj al retpaĝoj pri Esperanto, la klimato kaj lernejskrikoj (vidu ligilon sube) oni vidas, ke en Vikipedio la interesiĝo pri Esperanto (malofte en la amaskomunikiloj) estas pli granda ol pri klimataj aferoj (daŭre en la amaskomunikiloj). Interesa, ĉu ne?"

**Kia estas la 'klimatpolitiko' de la nova sveda registaro?**

Salutas Walter"

[https://pageviews.wmcloud.org/?project=sv.wikipedia.org&platform=all-access&agent=user&redirects=0&range=latest-90&pages=Esperanto|Skolstrejk\\_f%C3%B6r\\_klimatet|Klimat](https://pageviews.wmcloud.org/?project=sv.wikipedia.org&platform=all-access&agent=user&redirects=0&range=latest-90&pages=Esperanto|Skolstrejk_f%C3%B6r_klimatet|Klimat)

Per la suba ligilo ni vidas nekredablajn ciferojn:

**Nombro de vizititaj paĝoj pri:**

**Esperanto** — meznombro tage: **68**

**La klimato** — meznombro tage: **41**

**Lernejskriko por la klimato** — meznombro tage: **24**

**Ĉu iu volus respondi al Walter pri la klimatpolitiko de nia nova registaro? /Siv**

## Hungara verkisto skribas pri stranga sveda tradicio

K. Litoro trovis ĉi tiun rakonton de Ferenc Szilágyi



El Vikipedio.

Ferenc Szilágyi naskiĝis 1895 en Budapeŝto. Li lernis Esperanton en 1925, kaj fariĝis Esperanto-instruisto kaj verkisto. Iam post lia 40-jariĝo li transloĝiĝis al Svedio, kie li fariĝis civitano kaj tre aktivis por Esperanto. Li mortis en Borås en 1967.

Jen elĉerpaĵo el la novelo "Lumdiboĉo kaj lumofasto" de lia novelaro Koko krias jam! (1955), en kiu Szilágyi rakontas pri kulturŝoko de juna hungara esperantisto en la sveda decembra nokto de Sankta Luĉia (aŭ Lucia sen ĉapelo, laŭ Vikipedio). Sveda traduko aperas apude.

Ferenc Szilágyi föddes 1895 i Budapest. Han lärde sig esperanto 1925 och blev esperantolärare och författare. Någon gång efter att han hade fyllt 40 år flyttade han till Sverige, och där blev han medborgare och var väldigt aktiv för esperanto. Han dog i Borås 1967.



Här är ett utdrag från berättelsen "Lumdiboĉo kaj lumofasto" ("Ljusedeslöshet och ljusfasta") från hans berättelsesamling Koko krias jam! (En tupp skriker redan!, 1955), i vilken Szilágyi berättar om en ung ungersk esperantists kulturchock under den svenska lucianatten. En svensk översättning finns bredvid.



MIA AMIKO, kiun ni nomu pro simpleco Aleksandro – mi ne kuraĝas uzi lian veran nomon pro baldaŭ kompreneblaj kaŭzoj –, atingis tiun ĉi nordan landon unu jaron pli frue ol mi kaj havis precize tiom da scio pri la svedaj kutimoj kiel la aliaj sudeŭropanoj. Mi mem havis pli da scio pri tiu ĉi temo en la

MIN VÄN, som vi kan kalla Alexander för enkelhets skull – jag vågar inte använda hans riktiga namn av skäl som snart kommer att bli tydliga –, nådde detta nordliga land ett år tidigare än jag och har precis lika mycket kännedom om svenska seder som andra sydeuropeer. Jag själv hade större kunskaper



tempo de mia alveno, ĉar ĝuste Aleksandro avertis min kontraŭ diversaj eventualaĵoj. Li venis al la lando dum iu pluva septembra tago, kaj dum la svedoj sopiris al la vintra neĝo, li redeziris la someran varmon.



Venis oktobro kun la unua neĝo. Tiutempe li forlasis sian pli sudan agadejon kaj komencis fari prelegojn kaj ĉefe kursojn en la pli norda parto de la lando. Komence de decembro li estis en Vermlando. Vermlando estas gubernio kun nord-klimata karaktero, kun densaj, profundaj, altrokaj arbaroj, idiliaj lagoj, kiujn vintre neĝo kaj glacio kovras, kaj kun pitoreskaj, ruĝaj domoj, kiuj vigligas kaj intimigas la silentan, blankan-verdan regionon. La homoj de Vermlando distingas sin per malpli da rezervemo ol la plej multaj svedaj homtipoj, ili estas ŝercemaj, ilia fantazio flugas ofte preskaŭ same vikle kiel tiu de la sudlandanoj. Spite la modernigon de la industrio la tradicioj vikle vivas en tiu ĉi landparto, proksimume same, kiel en la plej proksima norda, najbara provinco, Dalekarlio.

Aleksandro havis malfacilan tagon la 12-an de decembro. Li havis du prelegojn en lernejoj, donis intervjuon al la loka gazeto pri si mem kaj pri la temo de baldaŭa publika programo. Poste li iom preparis la prelegon, skribis leteron, provis sin komprenigi kun la domanoj, sed la patro, metallaboristo, ne estis hejme; li laboris posttagmeze kaj nokte. Li estis la sola el la familio, kiu relative bone parolis Esperanton. La familio cetere ne estis malgranda; la geedzoj havis tri infanojn. La edzino estis natura, bonhumora sinjorino, kiu reduktis la materialon de la homa lingvo al dekduo da gestoj, kiujn Aleksandro provis diveni kun ne tre granda sukceso. El la infanoj du estis malgrandaj, unu el ili eĉ tre malgranda ankoraŭ ne kvarjara knabino, kiu tamen

om amnet när jag anlände, eftersom Alexander rätteligen varnade mig för olika eventualiteter. Han kom till landet en regnig septemberdag, och medan svenskarna längtade efter vintersnön önskade han sig sommarvärme.

Oktober kom med den första snön. Vid den tiden lämnade han sin mer sydliga bas och började att föreläsa och ge kurser i de mer nordliga delarna a landet. I början av december var han i Värmland. Värmland är ett landskap med ett nordligt klimat, med täta, djupa, klippiga skogar, idylliska sjöar, som är täckta av snö och is på vintern, och med pittoreska röda stugor som livar upp och gör den tysta, vit-gröna regionen mer hemtrevlig. Folket i Värmland utmärker sig genom att vara mindre reserverade än de flesta andra svenskar, de är skämtsamma, deras fantasi rör sig ofta lika energiskt som den hos folk i södra Europa. Trots industrins moderniseringar lever traditionen starkt vidare i den här delen av landet, ungefär på samma vis som i det närmaste grannlandskapet i norr, Dalarna.

Alexander hade en svår dag den 12 december. Han hade två föreläsningar i skolor, blev intervjuad av lokaltidningen om sig själv och om ämnet för ett kommande evenemang för allmänheten. Efteråt förberedde han föredraget en smula, skrev ett brev, försökte göra sig förstådd av hushållets medlemmar, men fadern, en metallarbetare, var inte hemma; han arbetade eftermiddagar och kvällar. Han var den enda i familjen som talade esperanto relativt väl. Familjen var förresten inte liten; paret hade tre barn. Frun var en naturnära, vänlig kvinna, som reducerade det mänskliga språkets material till ett dussin gester, vilka Alexander försökte gissa sig till med liten framgång. Av barnen var två små, ett av dem till och med en mycket liten flicka ännu inte fyra år gammal, som däremot talade svenska anmärkningsvärt bra. Pojken var redan mycket äldre, men man kunde ändå inte tala med honom. Det tredje barnet var en charmig och komplexfylld ung dam. Komplexen berodde delvis på den unga flickans ålder, hon var ännu inte helt fullvuxen, delvis kunde de hänföras till det

mirinde bone parolis la svedan lingvon. La knabo estis jam multe pli aĝa, sed ankaŭ kun li oni ne povis paroli. La tria infano estis ĉarma kaj kompleksoplena fraŭlino. La kompleksoj parte dependis de la aĝo de la junulino, kiu jam ne plu estis infano, sed iom ankoraŭ mankis al ŝi ĝis la plena aĝo, parte estis atribueblaj al la fakto, ke eksterlandanoj tiutempe estis maloftaj birdoj en la lando kaj sekve ege respektataj; fine ilin motivis la fakto, ke ŝi estis nur komencanto en Esperanto kaj sekve ĉiu aparta frazo, dirita en Esperanto, ekflorigis hontrozajn sur la delikata haŭto de ŝia vizaĝo. Aleksandro estis tute nova gasto kaj la interrilatoj estis reduktitaj al substrekita mimiko, gestoj kaj rideto, kiujn nur escepte interrompis dirita frazo:

– Bonvolu trinkas kafo – ĉar svedoj principe estas murdantoj de la akuzativo, kaj komencantoj ne komplikas sian diraĵon per la infinitivo.

Vespere, Aleksandro, kiu jam delonge ne estis libera, iris al kino, rigardis senkomprene svedan filmon; li iĝis dormema. Elirinte li refreŝiĝis kaj ĝuis la sekan, steloriĉan malvarman nokton, kiun misterigis la transkuraj, rapidaj, nervozaj vibroj de arĝentkolora norda lumo. Post la naŭa kaj duono li retiris sin en sian ĉambron. Li ricevis kiel gastĉambron, la grandan ĉambron de la familio. Tie estis la ĉie trovebla telefono, la librobretaro kun lede bindita kompleta enciklopedio kaj aliaj libroj, centra hejtado kaj aliaj luksoj, kiuj en tiu tempo estis simple ne kompareblaj al la laboristaj loĝejoj de la sudaj landoj, kaj ankaŭ nun ili estas eksterkonkursaj en komparo kun preskaŭ ĉiuj landoj. Li iom pripensis la diferencon inter tiu mondo, kiun li ĵus forlasis, kaj tiu ĉi; iomete li aŭskultis la radion, iom li provis skribi, sed li estis dormema kaj tuj post la deka horo li komencis sian heroan kaj nekonscian batalon kontraŭ la sveda lito. Aleksandro estis alta, iom korpulentema, nervoza juna viro. Hejme li kovris sin per plumkovraĵo, kiu obee sekvis la formon de la korpo, kaj la kapo ripozis sur pluraj dikaj plumkusenoj. Ĉi tie la lito estis mallarĝa, la kuseno estis diminutive eta kaj nur unu sola. Anstataŭ la plumkovraĵo oni uzis

faktum att utlänningar var sällsynta fåglar i landet på den här tiden och därför mycket respekterade; slutligen motiverades de av det faktum att hon bara var nybörjare på esperanto, och därför fick varje individuell mening som uttalades på esperanto skamrosor att framträda på hennes känsliga hy. Alexander var en helt ny gäst och relationerna reducerades till emfatisk efterhärming, gester och ett leende, vilka bara vid några få tillfällen avbröts av talade meningar.



– Snälla dricker kaffe [nominativ] – eftersom svenskar i princip är akusativmördare, och nybörjare inte komplicerar sitt språk med infinitiv.

På kvällen gick Alexander, som inte hade varit ledig på länge, på bio och såg oförstående en svensk film; han blev sömnig. När han kom ut kände han sig uppfriskad och njöt av den torra, stjärnrika kalla natten, som gjordes mystisk av de snabba, nervösa vibrationerna som gled förbi från det silvriga norrskenet. Efter 9:30 drog han sig tillbaka till sitt rum. Han hade fått familjens stora rum som gästrum. I det fanns den allstädes närvarande telefonen, bokhyllan med en komplett, läderbunden encyklopedi och andra böcker, centralvärme och andra bekvämligheter, vilka på den tiden helt enkelt inte var jämförbara med arbetares bostäder i sydliga länder, och till och med nu är utan konkurrens i jämförelse med nästan alla länder. Han tänkte en del på skillnaderna mellan den världen, som han just hade lämnat, och den här; han lyssnade lite på radio, försökte skriva lite, men han var sömnig och strax efter 10:00 började hans heroiska och omedvetna kamp mot den svenska sängen. Alexander var en lång, något koplent, nervös ung man. Hemma sov han under ett duntäcke som lydigt följde hans kroppsform, och hans huvud vilade på flera



plurajn lankovriolojn, kies randon oni metis sub la matracon, tiel, ke la aranĝo similis al sako, kies plej interna parto estis la suba kaj supra littukoj. Trankvilsanga svedo eniras vespere en tian sakon kaj matene li forlasas la sakon en la sama stato. Male: impulsa sudlandano rotacias en la lito dum la tuta nokto kaj sekve la linaĵoj kaj lanaĵoj parte kuntordiĝas laŭ tute komplika maniero (se entute oni povas nomi tian kaosecon «maniero»), parte ili malaperas en la diversaj anguloj de la ĉambro. Mem la dormanto informiĝas nur nerekte pri la stato de la aferoj. Aleksandro ekzemple songiĝis, ke oni forŝtelis liajn vestojn kaj metis lin sur la plej nordan punkton de la Norda Poluso. Intertempe li vekigis kaj provis fari ian improvizan ordon – sensukcese – kaj denove ekdormis kaj daŭrigis sian batalon kun la norda vento kaj arkta frostado, kontraŭ kiuj li vane knedis kaj tordadis la restantajn litkovraĵojn. La kuseno jam delonge malaperis sub la lito.

Iom post la 3-a horo matene, pli ĝuste, meze de la nokto, Vera, la menciita juna fraŭlino, transformis sin kun helpo de la du infanoj, kiuj volontege oferis la reston de la nokto; ŝi transformis sin je Luĉia. Ŝi surprenis la longan silkan Luĉia-robbon, sur sian talion ŝi metis arĝente brilanta zonon. La Luĉia-krono eĉ pliĉarmigis la delikatan vizaĝon, la ĵus muelita kafo ekbolis, la kukoj estis freŝaj kaj odoris allogaj. Ŝi metis ĉion kun la tasetoj sur pladon, metis sur ĝin la kafujon, kaj la juna generacio okupis sin pri la malfermado de la pordoj. Mi ne forgesu mencii la tri kandelojn, kiuj anoncis per sia lumo la alvenon de la printempa lumo kun harmonio al la printempa aperaĵo de la juna knabino.

Aleksandro samtempe daŭrigis sian senesperan songon kaj atingis tiun staton, ke li estis frostmortonta ĉe la poluso. Ankaŭ li havis longan dormĉemizon, kvankam malpli poezian ol la junulino, sed ankaŭ ĝi ne multe helpis la trodolorlotitan korpon de la junulo. En tiu stato li estis, kiam la geknaboj larĝe malfermis la du alojn de la malhela ĉambro kaj la etere delikata Luĉia kun sia brulanta kapornamo kaj kun sia bonodora kafo enpaŝis kaj la graciaj, maldikaj lipoj arĝentsoprane ekkantis la

tjocka dunkuddar. Här var sängen smal, kudden diminutivt liten, och var bara en. Istället för duntäcket använde man flera ullfiltar, vars kant man stoppade in under madrassen, så att arrangemanget liknade en säck, vars innersta del var under- och överlakan. På kvällen lägger sig en sällig svensk i en sådan säck och på morgonen lämnar han säcken i samma tillstånd. Som kontrast: en impulsiv person från ett sydligt land roterar i sängen hela natten, och följaktligen trasslar linnet och ullfiltarna delvis ihop sig på ett mycket komplicerat sätt (om man ens kan kalla ett sådant kaos ett "sätt"), delvis försvinner de i olika hörn av rummet. Till och med den sovande är bara indirekt informerad om sakernas tillstånd. Alexander till exempel drömde att någon hade stulit hans kläder och satt honom på den nordligaste punkten av Nordpolen. Då och då vaknade han till och försökte skapa någon sorts improviserad ordning – utan framgång – och föll återigen i sömn och fortsatte sin kamp mot nordanvinden och den arktiska frosten, mot vilka han förgäves knådade och vred de återstående sängkläderna. Kudden hade för länge sedan försvunnit under sängen.

Ett tag efter 3 på morgonen, eller mer exakt, mitt i natten, förvandlade sig Vera, den ovannämnda unga damen, med hjälp av de två barnen som bredvilligt offrade resten av natten: hon förvandlade sig till Lucia. Hon tog på sig det långa Lucialinnet av silke, runt midjan knöt hon ett silverbälte. Luciakronan gjorde hennes känsliga ansikte ännu mer charmerande, det nymalda kaffet började koka, kakorna var nybakade och doftade lockande. Hon ställde allt med de små kopporna på en bricka, ställde kaffekannan på den, och den yngre generationen gjorde sig nyttiga genom att öppna dörrarna. Jag får inte glömma att nämna de tre ljusen som med sitt sken annonserade vårljusets ankomst, i harmoni med den unga flickans vårutseende.

Vid samma tid fortsatte Alexander sin hopplösa dröm och höll på att frysa ihjäl på



Luĉiakanton – esperantlingve al la honoro de la gasto, kvankam kun iom da misprononco de norda komencantino:

*Sur la mar' brillas stel' de ardjento,  
dolĉe favoras ondoj kaj vento,  
dansas la barko kiel folio.  
Sankta Lusio, sankta Lusio!*



Aleksandro vekigis el sia inkubo kaj en la fono de la ĉambro li vidis malfacile, solene proksimiĝantan anĝelon. Lin regis ankoraŭ la spirita obtuzo de la sonĝo kaj mi denove volas substreki, ke li havis nenian scion pri la Luĉia-kulturo. Kion li povis pensi? Lia koro ekpulsis kun subita forto. Lia cerbo provis eklabori kaj fari konkludon. Sed pri kio li povis konkludi?

– Mi mortis – li pensis – kaj jen la anĝelo en blanka robo, kun kandela lumo sur la kapo, kun ĉiela kanto sur la lipoj.

La kafon li ne rimarkis, sed li pensis pri siaj antaŭaj duboj koncerne la ekziston de la anĝeloj. Li estis liberpensulo. Kiom li pagos nun por tio?

Kiam li atingis tiun ĉi penson, kaj tion li faris dum kelkaj sekundoj, li komencis akre protesti kontraŭ la tro frua morto. Malgraŭ la tre agrabla aspekto de la anĝelo, li ne sentis sin ankoraŭ matura enpaŝi la ĉielan juĝejon. Sed kion oni povus fari? La anĝelo jam estis preskaŭ ĉe lia lito, kie li kuŝis reviviĝinte post sia funebrinda morto kaj ŝi kantis:

– Sankta Luĉio, Sankta Luĉio!

Aleksandro ekŝvitis; lia angoro ricevis gigantajn mezurojn kaj ĝi ekstimulis lin krei,

Nordpolen. Han hade också en lång nattskjorta, men mindre poetisk än den unga kvinnans, och den hjälpte inte mycket den unga mannens överdrivet bortskämda kropp. Det var i detta tillstånd han befann sig när barnen öppnade det mörka rummets två dörrar och den eteriskt späda Lucia med sina flammande huvudprydnader och sitt ljuvligt doftande kaffe steg in, och hennes sirliga, tunna läppar började sjunga luciasången som en silversopran – på esperanto till gästens ära, dock med något av det felaktiga uttalet hos en nordisk nybörjare:

*På havvet tjiner silvertjärnan,  
lugna är vågerna, mild är vinden,  
den lilla båten dansar som ett blad.  
Santa Lucia, Santa Lucia!*

Alexander vaknade från sin nattmara och såg i rummets bakgrund en ängel närma sig högtidligt och med svårighet. Han styrdes fortfarande av drömmens andliga trubbighet och jag vill återigen understryka att han inte hade någon kännedom om luciatraditionen. Vad kunde han tro? Hans hjärta började slå med en plötslig kraft. Hans hjärna försökte arbeta och dra en slutsats. Men vad kunde han sluta sig till?

– Jag har dött – tänkte han – och här är en ängel i en vit klänning, med ljus på huvudet, med en himmelsk sång från hennes läppar.

Han la inte märke till kaffet, men tänkte på sina tidigare tvivel på änglars existens. Han var en fritänkare. Hur mycket skulle han behöva betala för det nu?

När han fastnade vid den tanken, och det gjorde han i flera sekunder, började han skarpt protestera mot denna olägliga död. Trots ängelns mycket behagliga utseende kände han sig inte mogen nog ännu att stiga in i den himmelska domens sal. Men vad kunde han göra? Ängeln var redan nästan vid hans säng, där han låg återupplivade efter sin sorgesamma död och hon sjöng:

– Sankta Lucia, Sankta Lucia!

Alexander började svettas; hans ångest tog gigantiska proportioner och fick honom att gråta, skrika. Den sved i hans lemmar, som



kriegi. Ĝi ekpikis liajn membrojn, kiuj subite reaktiviĝis, kaj Aleksandro saltis el la lito kaj komencis kriegi:

– Helpon, helpon!

La trankvile bela, tradicia bildo de la Luĉia-nokto subite transformiĝis al kompleta surealismo, kies enigmon neniu povis solvi pro momenta tempomanko. La granda figuro de Aleksandro moviĝis kun tia rapideco, ke liaj kapo kaj membroj kvazaŭ plibliĝis. Luĉia perdis sian tason kaj povis kapti nur la kafujon, kies brun-nigra enhavo lasis larĝan, longan makulon sur la neĝkolora Luĉia-roboto. La kanto subite ĉesis kaj la infanoj komencis laŭte ploregi. Nur la kandeloj restis seriozaj kaj rigidaj. Ili ne falis en panikon kaj daŭre brulis sur la kapo de la fraŭlino, feliĉe! La tuta domo mobiliziĝis kaj la patro forblovis la lumon de la kandeloj. Neniu komprenis ion, kaj daŭris tre longe la komprena kaoso, pri kiu eĉ Zamenhof mem ne estus povinta helpi.

La 14-an de decembro Aleksandro perletere informis min pri la strangaj kutimoj de la Luĉia-nokto kaj avertis min: se iam mi venos al tiu ĉi lando, preparu min dum la tuta jaro al la teruraĵoj de la Luĉia-nokto.

Jen mi transdonas mian utilan scion al la afabla leganto.

plötsligt reaktiverades, och Alexander hoppade ur sängen och började skrika:

– Hjälp, hjälp!

Den lugnt vackra, traditionella bilden av Lucianatten förvandlades plötsligt till komplett surrealism, vars gåta ingen kunde lösa på grund av tillfällig tidsbrist. Alexanders stora gestalt rörde sig med sådan fart att hans huvud och lemmar nästan flerfaldigades. Lucia förlorade sin kopp och försökte bara fånga kaffekannan, vars brunsvarta innehåll lämnade en bred, lång fläck på det snöfärgade lucialinnet. Sången slutade plötsligt och barnen började gråta hödljutt. Bara ljusen stod seriöst och rigitt. De föll inte i panik och fortsatte brinna på den unga kvinnans huvud, lyckligtvis! Hela huset mobiliserades och fadern blåste ut ljusen. Ingen förstod någonting, och förståelsekaoset, som inte ens Zamenhof själv hade kunnat avhjälpa, varade länge.

Den 14 december berättade Alexander för mig genom ett brev om de konstiga sederna på lucianatten och varnade mig: om jag någonsin kom till det här landet så måste jag förbereda mig i ett helt år för lucianattens skräck.

Så jag förmedlar min användbara kunskap vidare till dig, kära läsare.

## Interesaj homoj en Esperantujo

de Raita Pyhälä / Saliko



### Markku Sarastamo, finna artisto kaj inventisto

Markku Sarastamo (n.1948) estas ne nur artisto sed ankaŭ diligenta manlaboristo, magiisto kaj revanto iluzia. Inter lia ŝatokupoj oni trovas judon, fotadon, verkadon, ŝamanismon kaj lingvojn Esperanto, sveda, angla. Li eĉ scias kardi kaj ŝpini lanon. Aldone, per kelkaj japanaj frazoj li ŝatas amuzi kaj surprizi japanojn. Kelkfoje li estas nomata vilaĝa frenezulo, aliffoje memedukita artisto. En la aŭtuno 2022 li starigis ekspozicion en la finna urbo Tavastehus/Hämeenlinna. Tie estis





eksponigataj verkoj, kiujn li kreis lige kun sia libro *Karbujo*, la lando kiu ne ekzistas. La temon pri tiu lando li pripensis dum dudeko da jaroj.

Multe pli frue aperis de Sarastamo ĉirkaŭ 60-paĝa fabelo *La grafino kaj ŝia fantasta vivo*, unue en la finna, poste en Esperanto kaj fine printita ankaŭ brajle. Alia lia kreaĵo estas la ornamaĵa metala birdeto Tirpunen, da kiaj li milojn fabrikis kaj vendis. Markku Sarastamo kredas, ke kiu ajn povas lerni kion ajn, se li fervore deziras kaj fidas je si. Li pensas ke la vivo estas belega, ĝuinda ludo.



## Poemo de Johan Ludvig Runeberg el *Idyll och epigram*

(Idilioj kaj epigramoj) verkita en 1830. Runeberg estis svedparolanta finnlanda verkisto kaj poeto. Jen lia poemo en tri lingvoj, sendita al ni de **Tuomo Grundström**, Finnlando.

Jag blickar på tärnornas skara,  
Jag spanar och spanar beständigt;  
Den skönaste ville jag välja,  
Och sviktar dock ständigt i valet.  
Den ena har klarare ögon,  
Den andra har friskare kinder,  
Den tredje har fullare läppar,  
Den fjärde har varmare hjärta.  
Så finns ej en enda, som saknar  
Ett något, som fångslar mitt sinne.  
Jag kan ej en enda förskjuta;  
O, finge jag kyssa dem alla.

Kun tyttösten parvea katson,  
ma alati etsin ja etsin;  
kun kauneimman valita tahdon,  
en päätöstä millään voi tehdä.  
On yhden niin kirkkahat silmät,  
on toisen niin hehkuvat posket,  
on kolmannen kirsikkahuulet,  
on neljännen sydän niin lämmin.  
On sulonsa suurimmat kaikkein,  
niin jokainen katseeni kääntää.  
En yhtäkään torjua voisi;  
voi, kaikilta suukosen tahdon.

Rigardas mi junulinaron,  
mi serĉas kaj serĉas konstante;  
plej belan mi volus elekti,  
malcertas mi tamen pesante.  
L'unua min brile rigardas,  
la dua brulvange fascinas,  
la tria ruĝlipe ridetas,  
la kvara varmkore teneras.  
Ne mankas al iu kaptilo  
sufiĉa por volvi min tute.  
Neniun mi povas rifuzi;  
ho, ĉiujn nun kisi mi volus.



Teckning till *Idyll och Epigram* av Hanna Frosterus.

# La mondvegana tago, la 2an de novembro

Mikael Krall, rajtigita psikologo, loĝanta en Gotenburgo, skribas la jenan:

## Hodiaŭ (2 nov) estas Monda Vegana Tago!



La angla The Vegan Society skribas la jenon: "Veganismo havis pli longan historion ol vi povas imagi. Oni povus diri, ke ĉiam ekzistis veganoj – homoj, kiuj elektis vivi laŭeble sen la uzo de bestaj produktoj. Ofte tio estis pro religiaj aŭ spiritaj kialoj.

[...]

La Vegana Asocio en Svedio estis fondita en 1976. Veganoj manĝas nenion el la besta regno, eĉ ne mielon, kaj oni ne uzas aferojn kaj vestaĵojn, kiuj venas tute aŭ parte de bestoj. Laŭ National Today, Unuiĝintaj Nacioj taksas, ke **78 milionoj da homoj estas veganoj sur la Tero, t.e. 0,975% de la monda loĝantaro**. La lando kun la plej multaj veganoj estas Israelo, kie 5.2% de la loĝantaro ŝanĝis sian nutron al plant-bazita dieto. »

La evoluo en Israelo verŝajne estis plej influita de la usona vegano kaj aktivulo pri bestaj rajtoj **Gary Yourofsky**, kiu prelegis tie dum tempo. Ĉi tie vi povas vidi kiel TV-programo in Israel 2012 rakontas kiel Yourofsky influis centojn da miloj da homoj per siaj prelegoj:

<https://youtu.be/jQ7IYAleo5c>

Foje, la Edukministerio en Israelo decidis, ke Yourofsky ne plu rajtos prelegi al lernejoj. Ĉi tie vi povas vidi programsegmenton en kiu la ministro pri edukado de Israelo estas invitita al televidstudio, kie ankaŭ ĉeestas Yourofsky, por pravigi kial Yourofsky estis malpermesita prelegi:

<http://www.gary-tv.com/>

*Best Speech You Will Ever Hear – Gary Yourofsky*



GARY-TV.COM

<https://www.dailymotion.com/video/x18kmas>

Ĉi tiuj vortoj, kiujn mi skribis en afiŝo en Facebook en 2017, mi pensas, kaptas la problemon kaj montras ĝian solvon en inversa ordo: "La plej grava afero, kiun homo povas fari en sia vivo, estas foriri de manĝado de viando en la direkto de vegana dieto. La krueleco propra al la peco de viando sur la telero, aŭ al la kolbaso, sed ankaŭ al la lakto

kaj ovoĵoj, ne povas eble egali la bonkorecon kaj zorgon, kiujn multaj homoj donas aŭ volas esprimi en la vivo. **"Se ni deziras plene reprezenti bonon, ne damaĝi aŭ mortigi, kaj zorgi pri nia propra sano kaj la medio, tiam la vegana vojo estas la ĝusta, alie ne."**

/Mikael Krall



# Granda buntpego

de Renate Säfström

Pensu, ke vi devus "haki" pri la manĝaĵo ĉiun vintron!



Jen la ligilo al la retejo de Renate, vera kristnaska donaco!

<https://www.fotoforlivet.com/fotogalleri>



## Konsiloj de la Birdcentro

"Per kio mi povas nutri malsamajn birdojn?" estas demando, kiun ni ofte ricevas. Jen kelkaj konsiletoj por tiuj, kiuj volas helpi la birdojn en sia najbareco.

Neniam nutru birdojn per pano! Pano estas bona sed malriĉa je nutraĵoj kaj en tro grandaj kvantoj povas konduki al misformaĵoj ne korekteblaj.

Miksaĵoj por sovaĝaj birdoj en diversaj varioj ofte estas aĉeteblaj, kaj bona miksaĵo funkcias por multaj malsamaj specioj.

Hakitaj, laŭ-naturaj arakidoj kaj hakitaj sunfloraj semoj estas bonaj por, ekzemple, rubekuloj kaj merloj, kiuj ne povas fendi la malmolajn ŝelojn, kiuj foje troviĝas en miksaĵoj por sovaĝaj birdoj.

Se baj buloj estas aprezataj de multaj specioj. Se ili havas reton, forigu ĝin por eviti la riskon, ke la birdoj kaptiĝu en ĝi. Bonvolu

diserigi sebbulojn sur la tero por ekzemple turdoj kaj rubekuloj.

Pomo kaj piro estas aprezataj de merloj kaj betulturdoj.

Cignoj, anseroj kaj anasoj ŝatas manĝi grajnoj kiel hordeo kaj aveno. Avenaj grioj ankaŭ bone funkcias.

Memoru purigi la manĝejon regule, kaj bonvolu disvastigi la manĝaĵon sur la tero sur pli granda areo por la birdoj, kiuj preferas manĝi de tie. Koran dankon por pensi pri niaj birdoj, precipe dum la vintro.



## Strange – la fungoj bezonas okulvitrojn!

**Lars-Olof Granat:**

Nun venas la aŭtuno kun malhelo kaj nebulo, la fungoj bezonas okulvitrojn.

*Nu kommer hösten med mörker och dimma,  
svamparna behöver glasögon!*



## Pensoj pri pensoj

de Lasse Granat

Sen la moderna psikanalizo ni neniam eltrovus, ke kiam ni pensas pri io, tio, pri kio ni pensas, ne estas tio, kion ni kredas ke ni pensas, sed nur io, kio igas nin pensi pri tio, kio ni supozas ke ni pensas.

La teksto supre eble ŝajnas konfuziga, sed atendu ĝis vi vidos la saman tekston en la angla lingvo:

*Without the modern psychoanalysis we would never have found out that when we think a thing, the thing we think is not the thing we think we think, but merely a thing that makes us think we think the thing we think we think.*

Pardonu min, ne estas bona angla, sed eble amuza, ĉar mi uzis la vortojn "think", "think" and "thing" por la esperantaj vortoj "pensi", "kredi" kaj "io".

## Ankaŭ strange

**Robert De Niro** estas konata usona aktoro.

**Robot De Niro** estas la roboto de Filmstaden, Gotenburgo.

**Mi cerbumas:** ĉu la aktoro scias pri la roboto?



Do, mi ja neniam havos eblecon interparoli kun Robert De Niro. Sed kun Robot De Niro mi babilis antaŭ kelkaj tagoj. Mi demandis: Ĉu eblas aĉeti kreditbileton pri filmbiletojn en Lerum (mi ne volis iri al Filmstaden, Gotenburgo).

Bonan respondon mi ricevis: Vi povas aĉeti kreditbiletojn per nia retpaĝo [...]. Vi ankaŭ povas aĉeti niajn kreditbiletojn en Pressbyrån, 7-Eleven, Circle K, Willys kaj COOP en la tuta lando kaj en kelkaj elektitaj ICA kaj Hemköp.

Mi ja povis esti kontenta, sed mi pensis pri Robert De Niro kaj demandis al Robot De Niro: Ĉu mi povus havi foton de vi?

Robot De Niro: Bedaŭrinde mi ne komprenis vian demandon. 😊 Ĉu vi povus provi denove?

Mi: Kiel vi aspektas?

Robot De Niro: Daŭre mi ne komprenas la demandon. Se vi ne trovos respondon al via demando per FAQ aŭ en nia Babilejo, vi povas sendi vian demandon retroŝte al ni per la formularo ĉisube. Pri kio temas via demando?

Mi: Dankon, sed mi rezignas. Tamen estis agrable paroli kun vi.

Google Translate ankaŭ ja estas speco de roboto, pli kaj pli fidinda.

Ni ĵus finis *Sur bluaj planedoj* en nia Librorondo. En tiu libro kun multaj noveloj, de tempo al tempo temas pri AI – artefarita intelekto. Kiel ni reagus, se la roboto estus tiel bone farita, ke ni kredas ke ĝi estas homo? Ĉu ni bezonus novajn leĝojn, kiuj malhelpas ke ni estus trompitaj???? (Tiuteme legu la artikolserion pri Isaac Asimov en Ora Ĵurnalo n-ro 55 kaj 56.)

La nova libro en la librorondo en januaro estos *La Strato de Tanja* de Kalle Kniivilä. Ankoraŭ estas tempo mendi ĝin. La rondo estas senpaga, sed vi devas mem akiri la libron. /Siv

## Vojaĝo al Uzbekio

de Helena Johansson

Por mi, estis scivolemo, kiu igis min preni la sugeston de mia amiko vojaĝi laŭ la Silka Vojo en Uzbekio. La 22-an de septembro ni surteriĝis en Urgenĉ, kie estis 36 gradojn. Naŭ tagojn poste ni flugis de Taŝkento – tiam nur 26 gradojn. Urgenĉ, Ĉiva kaj Buĥaro estis por mi nekonataj lokoj, sed ne Samarkando, Taŝkento kaj Uzbekio, t.e. mi havis fantaziajn bildojn pri ili. La fakto, ke ĉi tiuj bildoj poste ne kongruis kun la realo, estas alia afero. Hodiaŭ, Samarkando kaj Taŝkento estas urboj de milionoj kun multe da trafiko. Preskaŭ ĉiuj personaj aŭtoj estis blankaj, ĉar ili ne varmiĝas kiel aŭtoj kun pli malhelaj koloroj.



La unua impresoj el la aviadilo estis ke tie estas dezerto kaj ke la tero estis tute plata (okcidente). Vi povis vidi laŭ kilometroj, ĉar ne estis montetoj aŭ arbaroj por kaŝi la vidon. Kie estis aliro al akvo, ĝi estis fekunda kaj abunda. Dum la sovetia epoko, plej multe de la kotonkultivado estis koncentrita al Uzbekio. Ĉar kotono estas tre akvopostula, tio kondukis al preskaŭ tuta sekiĝo de la Arala Maro.

Estis klare videbla kiel la antaŭsovetia kulturo konserviĝis ĝis hodiaŭ. Madrasaj (Koranaj lernejoj) moskeoj, palacoj, manfaritaĵoj kiel brodaĵo, tapiŝoteksado kaj paperfarado laŭ la tradicia maniero, estis ĉiuj reestigataj. Ne laste la blu-verda-blanka majoliko (hejma mozaiko/ceramikaĵo) estis mirinde bela. Endome, ekzistis aliaj koloroj en la ensemblo.



La vestaĵoj de la virinoj estis buntaj kaj kun tradiciaj ŝablonoj. La pli maljunaj virinoj portis malgrandan koltukon sur la "dorso" de la kapo. Tre malmultaj portis hiĝabon. Por ni, pli maljunaj skandinavaj virinoj, estis sperto esti konsiderataj ekzotikaj. Ni estas grizharaj kaj vestitaj malpli bunte (kaj portis longajn pantalonojn).


Tre amikemaj homoj, junaj kaj maljunaj, venis antaŭen kaj volis esti fotitaj kun ni. Junuloj venis antaŭen kaj volis paroli la anglan kun ni, klarigante, ke ili volas praktiki la lingvon. Neniu estis prema, sed ili estis ekstreme amikaj kaj gastamaj. Se iu vendisto estis tro proksima laŭ nia loka gvidisto, li tuj admonis lin havi distancon.



La manĝaĵo estis surprize malmulte spicita, mi atendis fortspicajn pladojn. Vino kaj biero estis servitaj en restoracioj. Multaj hoteloj estis sen alkoholo. Uzbekio havas historion, krom kun la Silka Vojo, kun "vizitantoj" (=konkerintoj) de Irano, Mongolio – Ĝingis-Ĥano en la 12-a jarcento, Timur Lenk en la 14-a jarcento – kaj Aleksandro la Granda jam la 4-a jarcento.

Daŭraj impresoj! Tia nekredbla historio, tiel bela arkitekturo, tiaj amikaj homoj. Kia mirinda travivaĵo!!!

/Helena



## La oka afrika kongreso okazos en Senegalo



Espoir Kasati invitas nin partopreni. Li mem iros tien de DR Kongo al Senegalo.

### La 8-a Afrika Kongreso de Esperanto – En Senegalo, 2022

Al la retpaĝo de la 8-a Afrika Kongreso de Esperanto (AKE), kiu okazos de la 26-a ĝis la 30-a de decembro 2022 en Tieso, Senegalo. Per tiu ĉi retpaĝo vi povas legi informojn pri la kongresa temo, ekscii pri kotizoj, rigardi fotojn, spekti filmetojn pri la kongresa lando, elŝuti dokumentojn, konatiĝi kun partoprenkondiĉoj kaj respondoj al oftaj demandoj, kaj plej grave – aliĝi al la kongreso!

<https://afrika.esperantujo.io/8-ake>

**Do, kial ne celebri Kristnaskon kaj Novjaron en Senegalo?  
Certe pli varme ol ĉi tie! /Siv**



*La Prezidanto de la Senegala Esperanto-Asocio informas.*

# Ni armigu la lingvan politikon!



Tomasz Kamusella.

de **Tomasz Kamusella**, Universitato de Sankta Andreo, Skotlando. Tradukis *Bardhyl Selimi*, Albanio, 12-an de novembro 2022.

Birgitta Anevik, kiu studas la albanan, atentigis nin pri la artikolo.

## Ni armigu la Lingvan Politikon!

La 24-an de februaro 2022 la tankoj, militaviadiloj kaj trupoj rusaj inundis Ukrainion norde, oriente kaj sude de ĝi.

Oni havis firman konvinkon ke la venko estus rapida, ĉar Ukrainio ne devus pluekzisti.

Unuvoĉe, la rusa registaro, la parlamento kaj la elito, subtenataj plimulte de la publika opinio, subskribis la historian pravigon de la prezidento por la genocidiga kaj ne provokita milito kun antaŭviditaj grandskalaj rezultoj.

Grava elemento de tiu pravigo estis la tezo ke ukrainanoj, belorusoj kaj rusoj tutnature konsistigas unusolan popolon (nacion). Ke ili parolas kaj skribas la saman lingvon ekde Mezepoko. Tial ne ekzistas la ukraina lingvo. Plejmulte, ĝi estas rusa dialekto kaj malplejmulte ĝi estas artefarita kreaĵo (neniam identigita, do, mitika) antirusa fare de aŭstroj kaj poloj.

Defende de demokratio kaj de la principoj de la Finala Akto de Helsinki por stabileco kaj paco en Eŭropo, la Okcidento estis devigita helpi al la bravaj defendantoj de Ukrainio per la sendado de armilaro, logistika bazo kaj financa helpo.

Ĉu tio sufiĉas?

Ĉar la lingva politiko ne estis uzata en la Okcidento por konstrui la aktualan politikon, la prenitaj mezuroj de Usono, EU kaj NATO kontraŭ Rusio ne trafas la etnolingvistikajn fundamentojn de la novimperia ideologio de Kremlo pri la Rusa Mondo aŭ *Pax Rusa*.

Tio necesigas ke ni ŝanĝu multajn aferojn.

## Ne plutolereblaj pretendoj de Kremlo

La 21-an de julio 2021, dum la preparoj por la estonta milito, la rusa prezidento aperigis sur la oficiala paĝo en interreto esejaĵon kun la titolo "Pri la historia unueco de rusoj kaj ukrainanoj".

Por ke tion vidu la tuta mondo, krom la rusa originalo, ĉi tiu teksto estas tradukita ankaŭ en la angla kaj la ukraina.

Vere, tio estas rara cedaĵo montranta la "purajn intencojn" de la rusa reganta elito. Tia "dialektika adaptaĵo" ne okazus en la antaŭvidita postmilito post kiam oni certigus la rusan venkon.

Ne estos bezono, ĉar danke al la koncentrejoj kaj mortaj tendaroj, rezultigis ke ĉiuj rusoj en Ukrainio kiuj nun ne konscias pri sia ruseco ekposedus precize la norman rusan...

La dialektoj, inkluzive la ukrainan, eniros en la historian muzeon.

La rusa prezidento asertas ke rusoj, ukrainianoj kaj belorusoj estis ĉiam unusola ortodoksa nacio, unuecigita pro la sama lingvo, tio estas la rusa, en la antaŭmoderna periodo, ties pli frua versio konata per "la frua rusa". Ĉiuj tri grupoj (popoloj?) konsistigis ĉiam "unusolan popolon kun unusola religio kaj lingvo".

Putino asertas ke la literatura elito de rusoj, ukrainianoj kaj belorusoj estis uzantaj saman skriban lingvon, dum la parola lingvo de la kamparanaro estis iom diferencigita. Sed, laŭ la rusa prezidento, ĉi tiuj diferencoj estis kaj estas ne konsiderindaj...

Li ne estas blinda rilate la uzadon de la ukraina robop govor (subdialekto, speco de la parolo) de rusoj en la ukraina branĉo. Sed, kiel tion substrekas la rusa prezidento, ankaŭ la supozitaj "ukrainaj" verkistoj aplikas la norman rusan lingvon en sia prozo.

Sinjoro Putin konkludas ke la rusa registaro kaj la reganta elito "respektas la lingvon kaj tradicion ukrainan".

Oni devas noti la malĉeeston de la difinita artikolo en la oficiala traduko por la vorto "ukrainiano", kio signifas ke, laŭ opinio de Moskvo, ili ne konsistigas nacion en sia propra rajto. Tial ne devas ekzisti ŝtato por ili, sed nur "lando" ene de la plilarĝigita Rusio.

Kiel oni substrekas evidente en la oficiala plano de Kremlo por plenumiĝo de la historiografiaj celoj de sinjoro Putin, oni ne permesos ŝtaton je nomo "Ukrainio" post la venko de Rusio.

Surtute, la "speciala operaco rusa" devas starti, ĉar la ekzisto de Ukrainio vere endanĝerigas Rusion...

Tiel, "la respekto" por la sekureco de ukrainianoj, la ŝtato, lingvo kaj kulturo, memdeklarita de sinjoro Putin estos atingita nur tra la detruo de la ŝtato, nacio, lingvo kaj kulturo ukraina...

Pro ĉi tiu kaŭzo, la aktualiĝo de ĉi tiu supera objektivo estos certigita per la uzado de la sistemo de okupacio plenskale per represado, kio devas daŭri almenaŭ kvaronjarcenton...



## Pragmatismo

Trompado, rektaj mensogoj kaj kontraŭdiroj logikaj estas tipaj por la sovetia epoko kaj same por la nuntempa novimperisma rusa propagando. Preteratenti ĝin alportas multe da risko. En certa tempo, je surprizo por la Okcidento, Kremlo povas agi fiintence kontraŭ Okcidenton. Tiamaniere Moskvo akiras puŝeblecon por la malfortika ekonomio, malfunkcia logistiko kaj subnorma teknologio.

Sed Okcidento estas kapabla por senigi Rusion de ties strategiaj antaŭecoj, kiujn ĝi ĝuas hodiaŭ. Tio inkludas ankaŭ la lingvan politikon.

Unue, en siaj servoj por la rusaj civitanoj, la okcidentaj ambasadejoj kaj konsulejoj devas oferti la tutan informacion kaj komuniki kun tiuj klientoj ekskluzive en la ukraina lingvo.

Due, la saman traktadon estas bezonate etendi ankaŭ por la rusaj civitanoj-rezidentoj aŭ petantaj azilon en la okcidentaj landoj.

Trie, iu ajn kunlaboro permesebla kun la rusaj institucioj aŭ rusaj individuaj civitanoj devas trapasi kanalojn nur tra la ukraina lingvo aŭ lingvo de alia okcidenta lando. Des pli, iu ajn opozicia rusparolanta amasmedio (stacioj de radio kaj televido, periodaĵoj kaj interretepaĝoj) kaj organizaĵoj reestablita aŭ fonditaj tra Okcidento devas oferti sian enhavon same en la ukraina.

La samajn mezurojn oni devas apliki ankaŭ por la civitanoj de Belorusio, kiu partoprenas en la genocidiga milito de Rusio kontraŭ Ukrainio. Tamen, ĉi-kaze, la opcio de la belorusa povas ofertiĝi ĉar la belorusa diktatoro, konsiderante sin "prezidento"



estas represinta aktive la belorusan lingvon kaj kulturon.

Rezulte, ĉiu sola civitano rusa aŭ belorusa, decidanta vojaĝi al, tra aŭ engaĝiĝas en iu intertraktado kun Okcidento, devas esti devitiga lerni pri la milito kaj suferi almenaŭ kelkajn malkonvenaĵojn administrajn kaj kognitivajn.

Tio estas nenio kompare al la sorto de milionoj ukrainaj rifuĝintoj, dekoj da milionoj ukrainianoj sen provizado de elektro, sen hejtado, sen akvo, nutraĵoj kaj medikamentoj, miloj da mortigitoj, masakritoj, torturitoj ĝismorte, aŭ terorigitoj, de multaj ukrainanoj suferantaj pro perdo de siaj proksimuloj aŭ handikapitoj.

Je la bona flanko, tiu severa postuleca rimarkigo pri la okcidentaj servoj kaj la kontaktoj kun la rusaj kaj belorusaj civitanoj, ofertita ekskluzive en la ukraina, vole-nevole instigos la menciitajn personojn eklegi en ĉi tiu lingvo kaj ekscii pli multe pri la beletro kaj

kulturo ukraina. En multaj kazoj, tiu neceseco fendos iel la etnolingvistikan monoliton de nova rusa imperiismo, kiu ne permesis eĉ kritikan opinion kaj individuajn iniciatojn.

La eventualaj protestoj de la rusaj civitanoj pri la fakto, ke la ukraina ne estas la rusa kaj ke ili ne komprenas la ukrainan, estus liverataj al tiuj aplikantoj. Se ili konsentus al la milito kaj la ideologio de la rusa prezidento, ĉu ili kredus ke la ukraina estas identa al la rusa?

Sed, se la aplikantoj al la demando, ĉu ili kondamnas aŭ ne konsentas al la milito de Kremlo en Ukrainio kaj ĉiuj ukrainaj aferoj, tiam oni devas klarigi al ili ke estas persona devo por ili eklerni la ukrainan kaj subteni ukrainianojn suferantajn de la rusa atako ne pravigita kaj ne provokita. Des pli, tiu demando lingva konsistigas grandan helpon por ĉiuj rusaj civitanoj por ke ili liberiĝu mense disde la dominanteco de propagando kaj ideologio de Moskvo pri la "Rusa Mondo".

## La Lingvodefendo en Svedio avertas pri estonta superregado de la angla super la sveda

**Språkförsvaret** – La Lingvodefendo en Svedio – reagas al la defio de la angla kontraŭ la sveda. Antaŭ la ĝenerala elekto en septembro 2022 Språkförsvaret sendis enketon al la ok parlamentaj partioj.

La 10an de septembro oni konstatis ke "neniu partio rigardas la minacon serioza."

Sed ĉu la angla vere estas minaco al la sveda??? Tutcerte! Oni estu blinda aŭ faras memtrompon, se oni ne vidas kaj aŭdas, ke la influo de la angla malrapide, sed konstante kreskas en nia lingvo.


La lingvoafero similas al la klimatafero, kiun malmultaj politikistoj ŝajne traktas serioze. Oni pensas ke la minaco ne estas tuja minaco. Kiam estontece estos evidente, ke la

sveda lingvo estas survoje malaperi – jes tiam la estontaj politikistoj traktu la problemon!! Ho ve!

**Ni ja havas lingvoleĝon ekde 2009, sed ĝi estas devontiga al nenio.**

Almenaŭ tri aferoj laŭ mi estas gravaj:

1. Fidindaj konoj en la sveda, antaŭ ol ricevi svedan civitanecon.
2. Ĉiu instruado en lernejoj, kiuj estas pagataj de sveda impostmono, estu farita en la sveda kun svedaj lerniloj ĝis la baza universitata ekzameno.
3. Ĉiu informado sur varopakaĵoj, venditaj en Svedio estu en la sveda.




Kun nek ĝojo nek fiero mi antaŭvidas la tagon por ĝenerala elekto. Kiel valoras nia demokratio, se neniu partio volas batali por nia propra lingvo? Mi esperas pri tute alia sinteno estontece.

La artikolo estas subskribita de **Bernt Abrahamsson, Ludvika.**

### La 13an de novembro:

Neniu el la partioj jesas al la demando ĉu la angla prenas tro da loko en la socio.

Lena Lind Palicki donas komenton per artikolo hodiaŭ en la gazeto Svenska Dagbladet:



*Plej granda interkonsento inter la partioj estas pri la graveco favori niajn naciajn minoritatajn lingvojn, kaj la sveda surdlingvo. Nur unu el la partioj jesas al la demando ĉu la angla prenas tro da loko en nia socio kaj nur SD (la plej dekstra partio) jesas al la demando ĉu la angla dominas tiel ke ĝi minacas la svedan.*

**La reta taglibro de Språkförsvaret** antaŭe skribis pri Kurt Grahn en Upsalo, kiu neniam studis la anglan. *Li ricevis monpunon de Smart Parkering Sverige AB, ĉar li ne komprenis la mesaĝon "Cancelled" sur sia parkkvitanco.*

*Post protestoj la kompanio Parkering Sverige ŝanĝis sian decidon kaj Kurt Grahn ne devos pagi, kaj se li jam pagis, li reen ricevos la monon.*

Oni esperas ke la kompanio ankaŭ ŝanĝos la tekston sur la parkkvitancon al la sveda (mia komento).

.....  
**La 23an de septembro 2022 al Språkförsvaret:**

"Saluton!

kaj dankon pro via arda laboro por la sveda! Mi membras en Språkförsvaret post longa tempo. Kial estas, ke la angla tiom enpenetris la svedan?" [...]. Ekzemple de la gazeto Svenska Dagbladet: "Ŝi (t.e. la "influencer" Ida Wang kun la firmao Ida Wang Beauty) loĝas en Marbella, kie ŝi kreas content kaj promotar la fabrikmarkon [...]"

Ŝajnas ke la skribantoj akceptas kiel fakton ke la legantoj havus angle-svede vortaron hejme. Alie ili ne komprenas ke ili skribas nekompreneble.

.....  
En la 29an de oktobro:

### **Infanoj parolas la anglan anstataŭ la svedan**

Personaro de infanejoj en multkulturaj areoj atentigas ke la infanoj kune uzas la anglan kiel komunan ludlingvon anstataŭ la svedan. "Estas granda defio, ĉar tiuj infanoj havas tro malmultan tempon renkonti la svedan" diras la esploristo Polly Björk-Willén".

Anna Asker.

.....  
Troviĝas internacia esplorado, kiu diras ke lingvoj havas malsimilajn statusojn. Infanoj notas tion kaj agas pro tio. Normale la sveda estas uzata kiel komuna lingvo inter infanoj kun malsamaj gepatraj lingvoj.

Tamen la angla pli kaj pli estas uzata. Kelkaj nur diras esprimojn kiel "Oh jes", sed aliaj pli flue parolas la anglan.

Polly Björk-Willén pensas ke estus malbona ideo malpermesi la anglan. Anstataŭ bonas ke oni aranĝas allogajn eventojn, kie la sveda estas nature parolata. Se la personaro povas trovi la saman instigadon paroli la svedan kiel la anglan, bonegus! Sen bona kono de la sveda jam en infanejo la infanoj postrestos en la lernejo.

**Språkförsvaret estas politike nedependa, memstara reto de personoj kiuj volas ke la sveda pluvivu!**

Siv kompilis kaj mallongigis leterojn al kaj de Språkförsvaret.

## Inköpsförslag till stadsbiblioteket i Göteborg

Följande böcker har vi tipsat Göteborgs Stadsbibliotek att köpa in.

**Bra om ni fjärrlånar, så att ingen kan skylla på dåliga utlåningssiffror framöver.** Ser biblioteket att en bok efterfrågas, så köper man förstås in den. Helst ska den vara mindre än fem år gammal. Det här blir alltså inte den enda gången Göteborgsklubben kommer med inköpsförslag.

1. **La Strato de Tanja** – Tanjas gata – om livet i Ryssland mellan 1917 och 2017. Författare: Kalle Kniivilä. Boken utkom 2017.

Den kommer från januari att vara bokcirkelbok. Köp boken (t.ex. från BOKUS) för det kan ta tid tills den finns att låna och kom gärna med i cirkeln! Vi diskuterar några kapitel åt gången och träffas på ZOOM sista söndagen i varje månad kl 17 – 18.

2. **Anne de Verdaj Gabloj** – Anne på Grönkulla – av L.M. Montgomery. Nyutgåva från Mondial 2022. En i många länder älskad flickbok.

3. **Paradizo ŝtelita** – Stulet paradiso – av Trevor Steele. Utkom 2012. Handlar om relationerna mellan Australiens ursprungsbefolkning och de som kommit senare

4. **Zulejka malfermas la okulojn** – Zulejka öppnar ögonen – av Guzel Jaĥina. Utkom 2022.



Handlar om Gulagperioden i Sovjetunionen. Väckte stort intresse, då den kom 2015 och såldes i 120 000 ex.

5. **Arne, la ĉefido** – Arne, hövdingasonen – av Leif Nordenstorm. Utkom 2005. En ungdomsroman om några vänner på vikingatiden. Kan med fördel läsas som bokcirkelbok.

6. **La knabo, kiu vivis kun strutoj** – Pojken som levde med strutsar – av Monica Zak. En tvåårig pojke kom bort från sin familj under en sandstorm. I 10 år levde han i öknen med strutsar, tills han hittades och fördes tillbaka till sin familj. Utkom 2019.

7. **La fotoalbumo** – Fotoalbumet av Trevor Steele. Ett familjedrama, som utspelar sig under tiden 1939 – 1965 i Australien. Utkom 2001 och fick en fortsättning 2005

8. **Legendoj el Madagaskaro** – Legender från Madagaskar – Utgiven av Fonto 2022.



9. **La lunkato kaj mi** – Månkatten och jag – av Lydia Corry Månkatten hjälper en liten flicka att flytta. Utkom 2022

10. **La mirinda sorĉisto de Oz** – Trollkarlen från Oz – av L. Frank Baum. Utkom på esperanto 2012.

11. **Marina** av Sten Johansson. Utkom 2013. Handlar om Marina från barndomen till vuxen ålder.

12. **Marina sur la limo** av Sten Johansson. En fortsättning på Marina. Utkom 2018

13. **Sur bluaj planedoj** av Laure Patas d'Illiers. Science fiction-noveller om rymdfärder och försök att bosätta sig på andra planeter. Användes som bokcirkelbok våren från april

till november 2022 i vår Librorondo på ZOOM.

14. **La malamiko de Putin** – Aleksej Navalnij kaj liaj apogantoj av Kalle Kniivilä. Utkom 2022.

Jag har beställt dessa 14 böcker. Inga Johansson har kontrollerat att de flesta inte redan finns i Gotlibs katalog. Det är ju fritt fram för alla att beställa esperantolitteratur på närmaste bibliotek. Bilden på förra sidan visar fler böcker, t.ex. "La morto de artisto" av Anna Löwenstein. Den handlar om kejsar Nero, som fått en slags upprättelse av sitt dåliga rykte. Den är intressant, men innehåller många sidor. /Siv

## Aŭtuna ardo kaj someraj sonĝoj

de Ingegerd Granat

Kompreneble, Gotenburgo, same kiel Stokholmo, havas oazon meze de la granda urbo.

En Stokholmo mi senpere pensas pri Skansen, fondita de Arthur Hazelius en 1891 kaj en Gotenburgo estas "Slottsskogen" (la Kastela arbaro) kie estas tiom multe por malkovri en ĉiuj sezonoj.

La dometoj sur la montodorso Malmgård vere valoras esti pli detale rigardata. Ni povas komenci la promenadon ĉe la agrabla restoracio La Blanka Bendo aŭ "Vita Bandet" – kiel ĝi estas populare nomata. Hodiaŭ la nomo estas "Villa Bel Parc".

Baldaŭ ni povas vidi **la Halandan dometon** (Hallandstugan), kiu aperetas sur la altaĵo inter ardkoloraj, altaj arboj. Ruĝa dometo kun blankaj anguloj. Tiu ĉi dometo venas de bieno, kiu situis en Knipered en Lindome, kie ĝi estis konstruita en 1805 kaj estis nomita "Börjesgården".



Hallandsstugan / La Halanda dometo (vidu ankaŭ p. 1)

Ĝi estis inaŭgurita la 26an de oktobro 1947 en Slottsskogen fare de la guberniestro de Halland. En ĉi tiu dometo, la "Lindomestolarna" (seĝoj de Lindome) havas siajn originojn. Meblofarado estis ofta flankokupo en Halando tiam. La Halanda Gildo ŝatintus vidi senplafonan trunkodomon kun herbokovrita tegmento, sed tio estis ekskludita fare de la Urba Kolegio.

La Slottsskogen ne estus malhonorenda, iu limo devus esti! Pli amuza memoro estas, ke Viktor Rydberg laŭdire skribis la unuajn strofojn de la poemo "Tomten" (la Koboldo) ĉi tie.

Li laŭdire uzis la ŝultron de sia edzino kiel skribtablo. Kiu scias?



*Dalslandsstugan / La dalia dometo.*

Nun ni daŭrigas la promenadon kaj tuj malsupre de la Halanda dometo estas **la Dalia dometo** (Dalslandsstugan), malgranda griza farmdomo de la 18-a jarcento, kiu venas de Steneby. Pajlaj ĉapeloj estis faritaj tie, kiujn la ĉevaloj, kiuj tiris la unuajn tramojn en Gotenburgo, portis kiel protekton kontraŭ la suno en la somero. Dalslandsstugan estas ĉarpentita kun longaj traboj kaj eĉ ne unu najlo estis uzita dum la ĉarpentado. Malnova tekniko.

La granda ĉambrego havas altan plafonon kaj rememorigas la halon de pranordia ĉefĉambrego, skribis GP kiam la domo estis inaŭgurita en la Luĉiatago 13 decembro 1937. Eble ĉi tiu griza kabano bezonas varman someran sunon kaj la odoron de kafo por plene interesi.

Do en ĉi tiu griza tempo de aŭtuno, ni revas pri la venonta somero.



*Smålandsstugan / La Smolanda dometo.*

**La Smolanda dometo** (Smålandsstugan). La 30-an de septembro, la sudgotika trabdometo el la mezo de la 18-a jarcento estis preta. Ĝi venis de Södra Unnaryd proksime de la lago Bolmen en Smolando. Provizejo el la 13-a jarcento en Långaryd kaj

la grandioza kampanilo de Stockaryd apud Sävsjö de la 18-a jarcento kompletigas la bienon. Nun la bieno estas uzata de la Smålanda Gildo por societema interrilato kaj por konservi Smolandajn tradiciojn kaj vivigi ilin.



La kabano ankaŭ estas muzeo, kiu montras kiel sveda terkultura familio loĝis kaj vivis en la 18-a jarcento. La litoj montras ke homoj estis multe pli mallongaj en la pasinteco. Ĉe la fino de la lito estis kabineto kun pordo, kiun oni povis atingi de la lito. La brandkabineto!

**La bieno Gräfsnäs** (Gräfsnäsgården). Ĉiu, kiu ne vidis popoldancgrupon prezenti sin sur la dancejo de Gräfsnäsgården, havas ion por atendi en la vivo. La kamparaj dometoj konservas la malnovan kulturon kun dancoj, popolmuziko kaj metioj.

La Vestrogotia dometo Västgötastugan aŭ Gräfsnäsgården, kiel ĝi estas nomita, ricevis sian lokon sur la montodorso Malmgård, sed nur venis tien en 1968 post kelkaj protestoj kaj malkonsentoj.



*La kampanilo ĉe Smålandsstugan.*



*Gräfsnäsgården / La bieno Gräfsnäs.*

Gräfsnäsgården venas de la paroĥo de Erska, kie ĝi funkciis kiel la loĝejo de la administranto por la Gräfsnäs-kastelo. La bieno havas 350 jarojn da historio, sed nun havas multajn agadojn dum ordinaraj semajnoj. Gräfsnäsgården ne estas muzeo sed loko kien tradicio kaj kampara kulturo estas transdonitaj.

Multaj junuloj dancis popolajn dancojn ekster Gräfsnäsgården sur la dancejo kaj multaj ludistoj ludis la malnovajn popolkantojn.





**"Polisvakta"** La malgranda blanka policdomo kutimis funkcii kiel polica gardista domo kaj kiel arestejo. Do pro kio vi finis en malliberejo? Jes, ekzemple pro kartludoj. La gazeto GMP skribis la 25-an de majo 1910: "Junulo estis juĝita de la policjuĝejoj antaŭhieraŭ al monpuno de 5 SEK pro kartludado en Slottsskogen". La 3-an de februaro 1876, parkgardisto nr. 7, (policisto) Niklas Nilsson dungigis kun salajro de po 60 taleroj por monato, senkosta loĝado en la domo kaj ekipigis per taŭga uniforma vestaĵo, oni povas legi el protokolo. La domo estis nomita "Polisvakta" laŭ Gotenburganoj dum longa tempo. Hodiaŭ ĝi funkcias kiel policmuzeo. /Ingegerd



"Polisvakta"

## Esperantorörelsen behöver medlemmar!

Svenska esperantister organiserar sig i Svenska Esperantoförbundet (SEF) eller i SLEA, som är arbetarrörelsens esperantoförbund. Göteborgs Esperantoförening hör till SEF. Man blir medlem genom att betala medlemsavgiften till SEF och anger att man också vill tillhöra Göteborgs Esperantoförening. Tidigare förmedlade den lokala klubbens kassör avgiften till SEF, men nu får man själv betala in den till SEF. För att förenkla för medlemmarna i Göteborgs Esperantoförening, så bestämde vi att avgiften till den lokala klubben på 100 kr/år ska vara frivillig, eftersom det numera alltså rör sig om två olika plusgironummer att hålla reda på. Det viktiga är att betala förbundsavgiften i tid,

den lokala avgiften kan betalas vid tillfälle, t.ex. direkt till kassören vid våra träffar eller till vårt lokala pg 436 12-1.

Om du vill bli medlem, skicka ett mejl till [svenska@esperantoforbundet.se](mailto:svenska@esperantoforbundet.se) så får du ett mejl tillbaka där du ombes lämna de uppgifter förbundet vill ha och information om betalningssätt. Förbundsavgiften är 180 kr/år om du vill ha medlemstidningen *La Espero* som en mejlbilaga, eller 230 kr/år om du vill ha tidningen i pappersformat. Du får också Göteborgsföreningens medlemsbrev (ingen extra kostnad – brevet skickas endast ut som mejlbilaga). Glöm inte att ange att du också vill tillhöra Göteborgs Esperantoförening. Kore bonvena!

**Svenska  
Esperantoförbundet**



Hemsida: <http://esperantoforbundet.se> där det också finns ett formulär för medlemskap.



## Gotenburgo 400-jara – aŭ 402-jara

– ĉar ni ne povis celebri la datrevenon ĝustatempe pro la pandemio.

Göteborg & Co invitis al kunveno en Redbergsteatern la 1an de decembro. Ingegerd kaj mi aŭskultis la tutan kunvenon per Zoom, Ingegerd tuttempe, mi parte. Reprezentantoj de organizoj kaj societoj rakontis pri kio ili volis kontribui al la celebri dum 2023

*El Wikipedia.*

Ni ja multe skribas pri Gotenburgo en Ora Ĵurnalo kaj dum nia somera kurso, 19–22 junio ni eble duontage iros tra la stratoj kun la verda flago kaj verdaj T-ĉemizoj (NE DEVIGAJ). Gvidanto devas paroli la svedan kaj tradukanto Esperanton por ke homoj povas aŭskulti ke nia lingvo estas uzata. /Siv

## Libroj kaj Librorondo

Lingvo sen literaturo, laŭ mi, estas malriĉa lingvo. Sten Johansson averaĝe skribas unu libron jare. En la novembra numero estis artikolo pri japanoj, kiuj legis Katrina malfruas samtempe ke ni legis ĝin en Redbergsskolan. Interese!

Se vi ekzemple pruntas po unu libron el la propono "Inköpsförslag till stadsbiblioteket"

en ci tiu numero, la bibliotekistoj trovos, ke indas aĉeti ilin. Troviĝas la "distancaj pruntoj".

KAJ restas kelkaj lokoj en nia Librorondo. Baldaŭ estos pli da eksterlandanoj ol svedoj.

Strange!



## Leteramikoj

11-jara Nils, komencanto ekde septembro, nun havas leteramikojn – du fratojn (9 kaj 11-jaraj), loĝantajn en Parizo. Ĉu tro frue jam havi leteramikojn??? Nils ne pensas tiel. Per helpo de sia avino, kiu ankaŭ estas komencanto, kaj de Google Translate, li kun fervoro prenos la taskon.

Bona ideo havi kursojn kun geavoj kaj genepoj. Ili ŝajne havas pli da tempo ol gepatroj.

Geamikoj en Francio helpis min trovi la leteramikojn. Fakte ili trovis kvar, sed Nils ne povas skribi al ĉiuj. Ĉu vi konas iun, kiu volus korespondi kun 11-jara Matilde, kiu lernis Esperanton en la kastelo Greziljono? Aŭ ĉu vi konas iun, kiu volas korespondi kun 11-jara Camille, kiu estas denaskulo (kaj flue parolas)? Ambaŭ loĝas en la okcidenta parto de Francio. Mi jam skribis al multaj gesvedoj, sed nur kvar respondis – ĉiuj diris ke ili ne konas iun. /Siv



*Finfine: Bonan Kristnaskon kaj  
Feliĉan Novan Jaron!*

*La redaktantoj de Ora Ĵurnalo*

